

POLA

XXX
JARO

MAJO
1936

5
NUMERO

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

NI SOLENU NIAN FESTONI!

Niaj kongresoj landaj kaj universalaj estas ĉefe konsiderataj kiel ĝojaj festoj de esperantista popolo. Multaj esperantistoj partoprenas en la kongresoj pro interna bezono de senpera persona kontaktiĝo kun tiuj, kiuj portas en la koroj la saman ideon — la ideon de Zamenhof. Sed niaj kunvenoj havas ankoraŭ aliajn celojn, eble pli gravajn ol la ĵus citita, nome celojn propagandajn kaj organizajn.

Malgraŭ ke Esperanto festos en la venonta jaro sian 50-jaran jubileon, kaj malgraŭ ke dum sia duonjarcenta ekzistado nia movado konsiderinde disvastiĝis, ni ne povas ĉesigi la propagandan laboron, ĉar multaj kampoj estas de esperanta vidpunkto ankoraŭ „senkulturaj“. Niaj kongresoj efikas propagande per si mem, per simpla fakto, ke la eksteruloj okulvideble povas konvinkiĝi pri vivanteco kaj taŭgeco de nia lingvo. Duaflanke ni ne forgesu, ke la homan menson speciale forte impresas la nombro. Al indiferentulo ne imponas la fakto, ke tiu aŭ alia eminentulo aŭ altrangulo aktive partoprenas nian movadon, sed lian indiferentecon povas venki nur lia konscio, ke Esperanto havas jam multenombrian adeptaron. Kaj ĝuste niaj kongresoj estas la plej taŭga instrumento por

evidentigi al la ekstera mondo nian nombron.

La interna flanko de niaj ĉiujaraj kunvenoj apartenas al la organiza kampo. Estas superflue diskuti pri signifo de organizo por nia movado, ĉar esperantismo estas ja kultur-socia movado, kaj neniu socio povas ekzisti sen pli aŭ malpli intima organizo. Kaj jen niaj kongresoj estas unuavice destinitaj por priparoli kaj solvi diversajn organizajn demandojn. Niaj kongresoj estas — niaj parlamentoj.

La nunjara kongreso, kiu dum Pentekosto kunvenigos pollandajn esperantistojn en Kraków, havos specialan gravecon, ĉar en ĝiaj kadroj je la unua fojo okazos kunsido de ĝenerala kunveno de P. E. D. La kongreso estu do vera revuo de niaj fortoj kaj penoj, revuo des pli signifoplena, ke Polujo havos en la venonta jaro la honoron gastigi en la ĉefurbo vastajn rondojn de ĉiunaciaj esperantistoj, kiuj venos al ni por soleni la jubileon de Esperanto.

Venu do plej multenombre al Kraków, kaj ne forgesu, ke la sukceso de nia 29. Universala Kongreso dependas en sufiĉe alta grado de la sukceso de nia baldaŭ okazonta landa kongreso!

Estraro de P. E. D.

DR. LEOPOLD DREHER

ĈIUJ AL KRAKÓW!

Kompreneble ne ĉiuj pollandaj samideanoj estas sufiĉe riĉaj por veni al Kraków. Tial la voko enfermita en la titolo de mia artikolo ne estu erare komprenata. Ne temas pri tio, ke ĉiuj devas nepre ĉeesti persone la Tutpollandan: spirita ĉeesto de ĉiuj estas tamen ebla kaj necesa. Mi diras eĉ pli: mi estas forte konvinkita, ke se venus nur 10 delegitoj, sed kiuj reprezentas ĉiujn niajn sampensantojn, tio estus multe pli ĝoja, ol se venus 100 esperantistoj, sed kiuj ne partoprenos en la kongreso pli ol korpe, dispromenante tra la urbo en la samaj horoj, en kiuj okazas laboraj kunsidoj!

Ni povas tion atingi, nome tion, ke almenaŭ spirite ĉiuj ĉeestu la Krakovan kongreson. La grupoj aranĝu en la monato majo unu aŭ du kunvenojn dediĉitajn al la problemoj de la Krakova kongreso. Tiuj kunvenoj estus samtempe elektkunveno: por elekti la delegitojn.

Jen estas fasko da problemoj diskutotaj en la kongreso, sekve problemoj, kiuj povas interesi ankaŭ la elektkunvenojn de la lokaj grupoj:

Antaŭ ĉio la problemo de la Jubilea Kongreso Varsovia. La esperantistaro pollanda atendas, ke la Jubilea plenumu sian gravan rolon, kian el ĝi esperas la esperantistaro tutmonda: demonstracii al la mondo civilizita, ke la kreaĵo de Zamenhof faris progreson dum la duonjarcento tiel grandan, ke ĝi meritas esti fine serioze traktata de la ŝtatoj, kaj ke la ĝisnuna disvastiĝo de Esperanto sendube elmontris, ke la dua duonjarcento nepre venigos plenan venkon de la lingvo. Tial la Tutpollanda siaflanke estas ŝarĝita per la granda tasko zorgi, ke la ekstera aranĝo de la Jubilea estu kiel eble plej impone konformigita al tiu unika tasko de la Jubilea fariĝi demonstracio de la esperantistaro tutmonda, demonstracio tiel okulfrapa, kia ĝis nun estis neniu el la tutmondaj esperanto-kongresoj.

Dua problemo de la Tutpollanda estu akcepto de rimedoj por plivigligi la enlandan movadon antaŭ la Jubilea, samtempe ebligante kaj plifaciligante la prelaborojn de la Jubilea: ju pli viglaj estos la lokaj grupoj, ja des pli certe povos laboradi nia ĉefurba jubilea kongreskomitato, certa pri tio, ke la gran-

da nombro de pollandaj kongreskotizoj garantios finance la sukceson de la Jubilea. En la aprila numero de P. E. mi menciis jam tiun mian proponon, aranĝi sistemon de premioj por la plej bonaj rezultoj, sekve mi ne bezonas ĉi tie ripeti la samon. Nur unu deziron mi volas esprimi ĉi-loke, nome tiun, ke la Tutpollanda pripensu la eblon influi la centrajn instancojn de la esperantista movado, ke por pollandaj partoprenantoj de la Jubilea la kongresa kotizo estu malaltigita, ĉar ja 40 zlotoj estas iom luksa elspezo; se vere impona nombro da gesamideanoj venu al la Jubilea, malaltigo de la kotizo povas montriĝi absolute necesa.

Tria problemo de la Tutpollanda: ne nur por akceli kaj helpi la Jubilean, sed ankaŭ por ĝenerale starigi fine nian landan movadon sur iaj fortikaj piedoj, necesas krei konstantan sekretariejon profesion por la landa organizaĵo. La ĝisnuna amatora laboro de la ekzekutiva komitato ja ne estas kulpo de la ekzekutiva komitato, kiu faras, kion ĝi povas. Bedaŭrinde, en la praktiko ĝi faras malmulte, ĉar ĝi malmulte povas... Nur konstanta, profesia sekretario povas ŝanĝi la nunan staton. Kvankam oni povas eĉ al tia sekretariado riproĉi ofte tion kaj alion, — pensu ekz. pri la neevitebla homa naturo, kiu kaŭzas, ke ju pli graviĝas ies posteno, des pli la tenanto de la koncerna posteno emas plivastigi sian estradon kaj potencon — tamen oni ne devas troe malesperi pri la ebleco trovi taŭgan personon: se li ne laboros, malgraŭ ke li estas pagata, kontentige, li povos esti eksigata, alie ol nepagata sekretario, kiun eksigas nur kongreso kunvenanta unu fojon en la jaro aŭ eĉ malpli ofte.

Kvara problemo: la organo de la landa organizaĵo devas porti veston konforman al la signifo de la lando aranĝanta Jubilean Kongreson de Esperanto. „Pola Esperantisto“ devas esti presata per belaj iom pli grandaj literoj, sur pli bona papero kaj pli granda paĝonombro. La unua paĝo de la gazeto devas esti pollingva, resp. dulingva, tiel servante por propagandi kaj instrui komencantojn. Modelon formas la numeroj de P. E. antaŭ la milito sub la gvidado de Antoni Grabowski. Por efektiviĝi tion

ĉiuj grupoj dum la Tutpollanda devas preni sur sin la devon ope aboni la gazeton almenaŭ ĝis la tempo de la Jubilea. Ankaŭ vendado de unuopaj numeroj per kioskoj kaj gazetvendejoj estas tre dezirinda el propaganda vidpunkto, se la gazeto ricevus tian aspekton, kian mi imagas.

Kiam ni kunvenos ĉe la Tutpollanda, ni konstatos ĝojigan fakton, nome, ke ni tute ne estas tiel malmultaj, kiel ni kutimas opini; ke ni tute ne estas senigitaj de taŭgaj personoj, kiuj povas gvidi la propagandon, kontraŭe, ni trovos inter ni kelkajn novajn homojn, plenajn de entuziasmo, ĉiam freŝa kaj sama, kian ni, malnovaj esperantistoj, posedis jam antaŭ jaroj. Eble ili ankoraŭ ne scios paroli tiel flue kaj korekte, eble ili ne havos eĉ la kuraĝon publike elpaŝi kaj komuniki al ni sian samideanecon, eble, ni mem ne emos fidi ilin tiom, kiom ili dezirus. Sed mi estas certa, ke ilia fervoro per si mem komunikigos al ni ĉiuj, por instigi nin ne plu plendi kaj lamenti, ne plu kunplekti la manojn kaj a-

tendi, kio okazos, sed mem ekvigli labori, mem ekgvidi la aferon kaj tiri aliajn per nia ekzemplo.

Estas vere, ke la objektivaj cirkonstancoj, la politika situacio same kiel la ekonomia, kiuj ambaŭ ja estas en interdependeco, ne favoras speciale nian tuthomaran pioniran laboradon. Efektive de kelkaj jaroj en la mezo de Eŭropo naskiĝis pacrompa fermento, minacante pereigi por longa vico da jaroj ĉion, kio estas akirita en la lastaj postmilitaj, sekve ankaŭ pereigi nian longjaran laboradon.

Sed kiu volus lasi sin timigi de fantomo aŭ alia nura minaco? Ankoraŭ kaj ankoraŭ tiaj aperados ĉiam denove sur nia malfeliĉa terglobo kaj kiu volas ĉe ĉiu ĝia sinvidigo malesperi, tiu devas entute rezigni la surteran vivon.

Sed kiu deziras vere pacon sur la tero, tiu trovas nur malfacile ion sur ĝia surfaco, kio pli rekte promesas pacon redoni al la disputantaj teranoj, ol faras tion nia tuthomara komprenilo Esperanto.

VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

okazos la 31. V. — 1. VI. 1936. en Kraków.

Adreso: P.E.D., Kraków, ul. Lubicz 34.

Kotizo: zł. 4.—, por familianoj, studentoj zł. 2.—, por senlaboruloj kaj blinduloj senpage. Konto P.K.O. Nr. 411.404 (Delegacja Esperantystów w Polsce).

Fervojsabato prizorgos P.E.D.

Blindulkaso: por helpi al blinduloj multenombrian partoprenon estas danke akceptataj mondonacoj.

Loĝejoj: pro multnombra vizitado de Kraków en tiuj ĉi tagoj estas necesa frua mendo. Je anonco post la 14 de majo ni ne povos garantii deziritan loĝejon.

Ekzamenoj okazos la 31. V.

La programo estas jena:

- | | |
|----------------|--|
| Sabato 30. V. | Akceptado de alveturintoj en la stacidomo. |
| | 21h Interkonatiĝa vespero. |
| Dimanĉo 31. V. | 9h diservo. |
| | 11h inaŭguro de la kongreso kaj konferenco de P.E.D. |
| | 13h komuna tagmanĝo. |
| | 14h laborkunsido. |
| | Ekzamenoj. |
| | 20h gaja vespero. |

Lundo 1. VI. 7,30h veturo al Sowiniec.

11h laborkunsido.

13h komuna tagmanĝo.

15h laborkunsido.

18h fermo de la kongreso.

Prezo de veturo al Sowiniec kaj reen zł. 1.—. Anoncu nepre vian partoprenon kun la aliĝo.

Organiza Komitato.

Samtempe kun la Kongreso okazos en la tagoj de 31. V. — 1. VI.

GENERALA KUNVENO DE P. E. D.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigataj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

Tagordo: 1. Raportoj, 2. Decido pri la enskribpago kaj kotizo, 3. Fikso de la sekvanta Ĝ. K., 4. Elektoj, 5. Demandoj kaj proponoj. Proponoj pri la tagordo devas esti senditaj 2 monatojn antaŭ la Ĝ.K.

Art. 26. § 1. La Ĝ. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigataj al voĉdono reprezentas minimume 1/4 da ĉiuj voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P.E.D. kune.

§ 2. Se la Ĝ. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la

Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la Ĝ. K., dum kiu la decidoj estas alprenotaj sendepende de la nombro de reprezentitaj voĉoj. Tiun ĉi novan Ĝ. K. ne koncernas normoj de art. 21 §§ 1 kaj 2 art. 25 § 3 alineo 1.

Estraro de P. E. D.

MEDITADOJ DE SAMIDEANO.

1. EVITU MALGUSTAN VOJON.

En lasta numero de P. E. ni povas legi paciencigan artikolon, koncernantan nian movadon. Verdire ĝi enportas ion novan... mirige novan. El kiuj artikoloj tie citita la aŭtoro ĉerpis sian naivan optimismon? Ĉu estas prudente taksu kiel bona la metodon de fermado de okuloj kontraŭ danĝero por ne vidi ĝin? Ni devas seniluzie rigardi nian pozicion por ne perdi niajn akiraĵojn. Se ni agados tiel, kiel konsilas la aŭtoro, kaj faros ĉion, kion ni opinios bona — niaj celadoj ne povos esti samdirektaj, kvankam ĉiu el ili estus aparte bona. Ni devas agadi organizite kaj por tio ni devas interŝanĝi antaŭe la opiniojn. Certe eĉ sen la konsilo pacienci ni devas esti tiaj, la aŭtoro prefere konsilu iomegon da pacienco, sed ne primoku tiujn, kiuj konsilas diversmaniere. Pretere dirante, li ne estas tamen tute malprava montrante, ke la konsilojn ne sekvas agoj kaj la konsilintoj ne donas ekzemplon per komenco. Sed tio ne koncernas min — ĉar en artikolo „SOS“ mi mencias pri senrezulta iniciato de realigo de mia ideo — cetere aprobita. Ĉu tia provo ne devas nin meditigi? Nura kredo pri venko de nia ideo ne sufiĉas — tia estas tre laŭdinda, sed bedaŭrinde senefika. Ni, maljunaĵoj kaj malnovaj esperantistoj, jam konas tiujn penajn ekflugojn kaj spertis, ke nur kolektiva fortostreĉo povas esti sukcesa. Se diversaj artikoloj en P.E. estas samsencaj — tio montras unuecon de ĝenerala opinio, sed se ili estas konsiderotaj kiel senbezonaĵoj, tiam ni legados en P.E. nurajn felietojn aŭ kronikaĵojn. Pro tio, ke konsiloj ne estas realigataj, oni ne povas ja kulpigi ilian aŭtorojn. Unuvorte mi esprimas konvinkon, ke pli utila por nia movado estas troa pesimisto, sobrevivanto, ol optimisto, kiu pensas, ke sufiĉas por venko de l' ideo tio, ke ĝi estas bona. Eĉ se dum la Krakova Kongreso ni unuecigos niajn fortojn kaj sam-

direktigos ilin, ĉiam povos esti eltrovitaj novaj kaj pli bonaj vojoj al nia venko. En modero estas vero.

2. VOJO AL PLIFORTIGO.

Ĉiu ni plenaprobe legis pri projekto de Interŝtata Lingva Akordo. Kaj nur. La projektita kolekto de subskriboj ne sukcesis. Sed al ĝi estas ankoraŭ alia vojo. Ni scias, ke krom ni, esperantistoj, kiuj konscias plene pri nia celo, estas multaj simpatiuloj. Ilin ni devas organizi kaj tiam kolekto de subskriboj estos tute facila. Ni enlistigu ilin kiel membrojn pasivajn de Pola Esperanto Asocio. Laŭstatute tiaj membroj ne ekzistas, do ni ŝanĝu la statuton. Tion ni povas fari dum nia landa kongreso okazonta pentekoste en Kraków. Ĉar ĉiu ano eĉ pasiva devas pagi kotizon, por tiu ĉi kategorio de membroj ni fiksu 20—25% membropagon krom la enskriba. En certaj okazoj oni povas unuopajn personojn liberigi de kotizo. Tiamaniere ni povus akiri multajn simpatiulojn kiel „pasivajn subtenantojn“ kiuj nur ne rajtos voĉdonadi, havante kune aliajn rajtojn. De tempo al tempo ilia pago povos esti malgrandigata, se tio necesos por ilia plimultnombro. Ĉi tiu formo de plimultigo ne estos danĝera kaj samtempe materiale plifortiganta nian movadon, kio s'iallanke ebligas pli grandan propagandon ktp. Gesamideanoj! Koncerna propono pri ŝanĝo de statuto jam estas farita al Varsovia Pola Societo kun propono aranĝi dum Krakova Kongreso kunvenon de delegitoj. P.E.A-anoj subtenu ĝin, skribante al tiu Societo, kaj dum la Krakova. La problemo estas gravega, de ĝi dependas niaj pluaj paŝoj. La Jubilea Kongreso proksimiĝas. Ni devas pliintensigi nian agadon kaj plidensigi niaj vicojn. Eĉ se simpatiuloj komence ne scios nian lingvon — tio iom post iom povas aliĝi. Kompreneble eĉ tio ne haltu normala agado. Ni esperas vian subtenon. Mi mencias, ke la ideo ne estas mia, sed mi iom ĝin modifis.

3. ĈU TIO ESTAS DECA?

Antaŭ dekelkaj monatoj nia movado en Polujo havis unu ĵurnalon, kiu aperadis proksimume du jarojn, mi bone tion ne memoras. „Esperanto por ĉiuj” — estis malkara gazeto, kaj tamen sufiĉe interesa — ni ne estu pro tio tro postulemaj. Mi estas certa, ke ĉiu esperantisto, eĉ ne bonstata, kaj ĉiu eĉ malgranda esperanta rondo povis elspezi ĝian abonprezon. Kaj kio do okazis? Antaŭ jaro tiu ĉi ĵurnaleto ne plu aperis. Nu, eble estas kulpo de krizo, cirkonstancoj, de materialaj ebloj... ĉio povas esti. Sed kio fariĝis kun pagitaj por tiu 1935-a jaro tutjaraj abonoj de societoj kaj unuopuloj? Mi estas certa, ke en tuta

Polujo troviĝis ne nur sole mi kaj reprezentata de mi societo. Ĉu estas sufiĉa klarigo (ne skriba), ke dissendo de avizoj pri provizora ĉeso de eldonado estas tro multekosta? Ĉu tian avizon nia „Pola Esperantisto” ne estus presinta senpage? Kaj se ĉeso de eldonado ne estos provizora, kiel ĉi ĉio aspektas? Mi pensas, ke se ĉiu paginto rericivus sian monon, li komprenus la aferon eĉ sen iomkosta sciigo. Sed ja, ĝesamideanoj, ĉu ni devas kredi, ke eldoninto forgesis. Eble, eble, ja pasas jam unu jaro. Mi pensas, ke la afero devas esti klarigita, alie...

ing. M. Chmieliński
Łódź.

SUR LA MARGĜENOJ...

En „Pola Esperantisto” aperis kelkaj artikoloj, kies aŭtoroj atentigas pri la malbona stato de nia movado. Mi ĝojas, ke multaj samideanoj alvenis al la sama konkludo, kiu estas klara al mi jam delonge. Nia movado estas danĝere minacata! La sama situacio estas ĉie. Anstataŭ progresado ni perdis multajn poziciojn, kies akirado kostis al ni multege da energio kaj kelkara laborado. Se la afero tiel marŝos pene, do, dum la kvindekjara jubileo la restaĵoj de la tutmonda esperantistaro devos priplori la „perditan Paradizon”. La nunan staton la movado ŝuldas. antaŭ ĉio, al la kreskanta influo de diversaj, ofte absurdaj, rastorioj kaj blinda nacia Esperanto, celanta al la plej vasta interpopola kaj internacia demokratiĝo, estas nun traktata kiel utopiaĵo kaj... hebreaĵo (do, sekve, tre malutila!). Tial nepre estas necese, ke ĉiuj veraj esperantistoj, rilatantaj serioze al la movado eklaboru! Nepre necesas, ke ĉie, tra la mondo, vekigu la samideanoj al la energia agado. Grave estas, ke oni forgesu pri internaj malpacaĵoj kaj forigu la ofte intence faritajn malhelpaĵojn. Alie la movado tute ruiniĝos!...

* * *

En la kelkaj artikoloj estas preparolita la Jubilea Kongreso en Varsovio. Ĉu tiea movado estas sufiĉe forta por aranĝi la imponan jubilean feston de la oraj jaroj de Esperanto? — timeme demandas la aŭtoroj. Anstataŭ respondo mi citos nur kelkajn „florojn” el la bukedo de nia movado en Varsovio.

1927 j. Internacia Postkongreso en Varsovio kun partopreno de 340 eksterlandaj samideanoj,

1930 j. Sukcesplena plebiscito por ŝanĝi la nomon de str. „Dzika” je Zamenhofa (ĉ. 25.000 subskriboj!).

1931 j. Vojaĝo tra Polujo de la hinda samideano L. Sinha, kies centro troviĝis en Varsovio,

1931 j. II Internacia Postkongreso en Varsovio, kies modelajn kaj interesajn aranĝojn laŭdis multaj eksterlandaj esperantistoj. Dum la Postkongreso oni enmuriĝis la marmoran tabulon en la domo, kie loĝis la Majstro,

1932 j. I-a sukcesplena vojaĝo tra Polujo de la negra esperantisto k. Ajayi kies organiza centro troviĝis en Varsovio,

1933 j. Nacia kongreso sub la protekto de ĉefministro, okazinta en la urbo-domo. Dum la kongreso oni enmuriĝis la memortabulon al Grabowski.

Ĉu mi citu ankaŭ la multnombrajn esper. solenaĵojn kun partopreno de diversaj gravuloj kaj oficialuloj, la brilajn ekspoziciojn kaj propagandajn semajnojn? Ĉu mi forgesu mencii, ke en Varsovio ekzistis societoj, kiuj funkciis preskaŭ ĉiujespere kaj kies sidejoj ne troviĝis sole en la jarlibro de U.E.A. (Pro la certaj kaŭzoj ili nun funkcias iom pli malofte, sed nur provizore!).

Se mi volus priskribi ĉiujn sukcesintajn aranĝojn de la Varsovia esperantistaro, mi devus plenumi kelkajn numerojn de „P. E.”.

Jes, kara! samideanoj, en Varsovio ekzistas kapablaj, iniciatemaj kaj laboremaj esperantistoj. Oni devas nur ebligi al ili laboradi por la Kongreso. Kaj ni esperu, ke dank' al ilia laborado nia Jubilea kongreso estos sukcesplena, impona kaj brila festo de la oraj jaroj de Esperanto.

Isaj Dratwer,
prezid. de Vars. Esper. Societo.

XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. AŭGUSTO



Wien, 8—15 de aŭgusto 1936.

Komuniko Nr. 4.

Kotizo ĝis 30 de junio: sv. fr. 25.50, por familianoj 16.—, por gejunuloj malpli ol 18-jaraj 10.80.

Programo:

Sabate, 8 de aŭg.: Inaŭguro de la Kongreso. Interkonatiĝa Vespero.
Dimanĉe, 9 de aŭg.: Diservoj. Ekskursoj. Prezento de la opereto „La blanka ĉevaleto“.
Lunde, 10 de aŭg.: Inaŭguro de Somera Universitato. Ekskursoj.
Marde, 11 de aŭg.: Laborkunsido. Fak-kunsidoj. Akcepto en urbdomo ĉe la urbestro. Fotografado. Vizito de Hofburg. Ekskursoj.

Merkrede, 12 de aŭg.: Somera Universitato. Fak-kunsidoj. „Konferenco de la virinoj“. Ekskurso.

Ĵaŭde, 13 de aŭg.: Tuttagaj ekskursoj (aparte pagotaj).

Vendrede, 14 de aŭg.: Laborkunsido. Fak-kunsidoj. Ekskurso. Kostumbalo sub la devizo „La Kongreso dancas“ en ĉiuj festsalonegoj de Imperiestra Kastelo.

Sabate, 15 de aŭg.: Solena Fermo de la Kongreso.

„Tra Aŭstrio“ ekskurso de 15—21 de aŭgusto 1936. entenas vojaĝon Wien — Graz — Klagenfurt — Grossglockner — Salzburg — Gaisberg — Salzkammergut — Gmunden — Linz — Melk — St. Pölten — Wien.

Detalojn pri programo de la Kongreso kaj ekskurso „Tra Aŭstrio“ petu de P. E. D., Kraków, Lubicz 34. kaj por Varsovio de H. Weinsteinówna, Warszawa, Leszno 99. m. 5. Nepre aldonu pmarkon por respondo.

Detalojn pri karavano legu en Nro 4. de „Pola Esper.“.

Por orientiĝo ni tre petas ĉiujn dezirontajn veturi Kongreson anonci sin jam nun, sen iu sindeviĝo! Temas nome pri proksimuma nombro da voluntuloj!

Ĉe demandoj aldonu pmarkon por respondo.

Ludwik Kutscher

Ekzekutiva ano de P.E.D.

ESPERANTO EN POŝTŝPARKASO EN LWÓW.

Kontente ni konstatas, ke nia kara lingvo Esperanto sukcese disvastiĝas sur la komerca kampo, atingante plenan atenton kaj seriozan traktadon flanke de multaj komercaj entreprenoj kaj ŝtataj institucioj.

Nia agrabla tasko estas raportoj pri la enkonduko de Esperanto en la „Poczto-wa Kasa Oszczędności“ de Lwów.

Gravaj negocaj rilatoj kun „Literatura Mondo“ en Budapeŝt kaj Ing. Wüster en Wieselburg klare montris al la potenca pola entrepreno, Poŝtŝparkaso, ke la gepatra lingvo, la pola, ne taŭgas esti interkomprenilo kun du malsamlingvaj landoj, kaŭzante nur Babelan turon. Senescepte Esperanto firmiĝis la gravajn rilatojn kun la menciitaj 2 grandaj konataj entreprenoj, kaj la konceman interkorespondan taskon lerte kaj en perfe-

kta maniero plenumis la konata, malnova samideano, s-ro Bronisław Tuszkie-wicz, estro de la administra fako en la P. K. O. de Lwów.

La grava fakto pri la praktika valoro de Esperanto en la komerca vivo konvinkis estimatan Direktoron de P.K.O., s-ron Eugenjusz Szubert, kaj dank' al lia bonvolemo kaj favoro al nia movado vestigis Esperantokurso, gvidita en agrabla maniero de s-ro Tuskiewicz, laŭ la lernolibro de Dr. Dreher, L. K. en Kraków.

Partoprenis la estimata Sinjoro Direktoro kaj la oficistoj de P. K. O. Por praktike prezenti la personan konversacion inter 2 malsamlingvanoj, s-ro direktoro Szubert invitis la vianan prelegantinon s-aninon Minuška Mantel, kiu paroladis pri la temo „ĉirkaŭ la mondon

kun la verda stelo", de temp' al tempo lerte poligita de sinjoro Tuskiewicz.

Fraŭlino Mantel kaj la fervora Krakova samideano, s-ro Józef Toczyski, disponigis siajn riĉajn Esperanto-kolektaĵojn kaj la sciavidaj estontaj verdstelanoj kontente partoprenis la senpagan belan Serer-vojaĝon „ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo“.

Por ĝuigi al la fervoraj aŭskultantoj

juvelon de la pola literaturo, nia estimata s-ro Toczyski laŭtleĝis fragmentojn el „S-ro Tadeo“, majstroverko de Mickiewicz, en la mirinda traduko de Grabowski.

La finon kronis enmanigo de flora korbo al la prelegantino, prezentita de Propaganda Ĉefo de P. K. O. s-ro Zygmunt Vogel, en la nomo de la oficistaro kaj konvena fotografiĝo por „Heroldo“.

AL JAKOBO ŜAPIRO.

25-jara jubileo en nia movado estas vera evento. Ne nur pro tio, ke nia movado mem estas ja esence tiom juna ankoraŭ, ke apenaŭ venontjare ĝi atingos la kvinan jardekon. Sed ĉefe pro tio, ke resti en la unuaj vicoj, inter niaj plej energiaj aktivuloj, dum 25 jaroj, signifas siaspecan heroecon.

La historio de nia movado scias rakonti pri grandaj (almenaŭ por mi) viroj, kiuj ofte imponis al ni per vere grandaj kaj gravaj faroj — tiuj viroj havis meritojn, havis entuziasmon, havis energion kaj fakte multon faris por nia movado, sed unu ili ne havis: la paciencon elteni sur sia posteno. Ofte tiujn eminentajn pionirojn forigis de nia movado nura bagatelo, ofte ilin fortimigis la malvarmo, la konfuzanta indiferenteco, kun kiu la vasta publiko konsideris nian aferon — ili estis bonaj generaloj, kiuj en kelkaj momentoj eĉ brilajn venkojn atingis, sed ili ne estis bonaj soldatoj, marŝantaj de batalo al batalo. Eble pro tio cetere ni havas en la verda armeo pli da generaloj ol soldatoj...

Ŝapiro apartenas al tiuj maloftuloj, kiu esperantistiĝis en la knabaĝo. Lindo neniu varbis, neniu konvinkis. Al nia movado li simple mem venis. Kaptis lin la grandiozeco de la Bela Afero, kaj ĝi kaptis lin tiel forte, ke li devis jam firme resti en ĝi, sen la espero, sen la ebleco liberiĝi el ĝi iam ajn.

„Kion havis li plej karan: la junecon“ li metis sur la altaron de Esperanto — ĝi estis lia unua amatino, pri ĝia beleco, pri ĝiaj gloraj sukcesoj li revis febre dum sen nombraj noktoj, al ĝi kaj por ĝi li oferis ĉiujn riĉaĵojn de sia juna vivo: sian malkvietan energion, abundan iniciativon kaj netakseblan laboron, jes — tiun soldatan, pioniran laboron! Esperanto eniris lian sangon, neelŝireble enradikiĝis en lian memon kaj fariĝis nedisigebla parto de lia tuta vivo. Kaj tiu granda amo estis sendube

reciproka. La nekutima amatino enverŝis en lian animon lumon kaj ĝojon. Al la tiam ankoraŭ juna knabo ĝi mirakle malfermis novajn, nekonatajn, vojojn, malŝlosis antaŭ la sciavida junulo la pordojn de l' mondo, en malkvietaj noktoj flustris en liajn orelojn strangajn neniam aŭditajn kantojn pri tutmonda frateco, semis en liajn okulojn „la belan sonĝon de l' homaro“ — ĝis kiam iun tagon la juna knabo konstatis en si iun mirinde agrablan familiarecon kun ĉiuj, ĉiuj homoj sur la terglobo...

Amo tiom pasie travivita pasas neniam.

25 jaroj da senĉesa, ĉiutaga griza laboro poresperanta, kara jubileo kaj amiko, — kiel bela epopeo de esperantista heroeco, de esperantista honoro! Kvaronjarcento de pionira sinoferemo, de kavalira batalado por granda afero kaj kontraŭ homa etanimeco, por la venko de la Verda Stelo kaj kontraŭ homa mallumo, por la frateco de la gentoj kaj kontraŭ interhoma maljusteco, por la idealoj de la Esperantismo kaj kontraŭ ĉiuj nigraj semantoj de malpaco! Dum dudek kvin jaroj resti la neŝancebla disĉiplo de Zamenhof — kia feliĉo, kia honoro, kara samideano Ŝapiro!

En la tago de via jubileo, kiun vi solenas en la modesta rondo de viaj Esperantistaj amiko! Bialistokaj, kion ni — viaj amikoj kaj samideanoj el aliaj urboj kaj landoj — alportu al vi krom la elkoraj bondeziroj kaj gratuloj? Sed ĵal ni volas diri al vi, ke en via malfacila pionira laboro vi ne restis sola, ke vigle niaj koroj ankaŭ batas por niaj kaj viaj altaj idealoj, ke ne perdiĝis la celo, por kiu vi vian vivon dediĉis, ke kunbatalas kun vi la granda kaj brava taĉmento Zamenhofs, ke valoris batali por Esperanto 25 jarojn kaj nepre valoros batali por ĝi pliajn 50 jarojn!

I. Lejzerowicz.

JAKOBO ŜAPIRO [JOŜO].

1911—1936

(al la 25-jara jubileo de E-agado)

Naskiĝas en Białystok en 1897 kaj kiel 14-jara knabolernanto esperantistiĝas rapide kaj bone ellernas la lingvon kaj komencas poresperantan laboron. — Loĝante tiutempe en Łódź, gvidas kursojn por kolegoj - lernantoj, kunlaboras en tiea esp. societo kaj en ĝia ĵurnalo. Tiam



li verkas la babiladojn de bonhumora Zamenhofano, kiuj en postaj jaroj en libra formo aperas en du eldonoj. Redaktas esp. fakon en „Lodza Gazeto“.

En militjaroj li verkas broŝuron s. t. „Esperanto kaj la mondmilito“, eldonita de la biblioteko de G. Davidov. — Revenas Białystokon kaj komencas la esp. laboron tie. — Gvidas kursojn en komerca lernejo de Ginzburg, propagandas per la gazetaro. — Elserĉas la straton, en kiu naskiĝis la Majstro kaj estante sekretario de la urbo Białystok, akcelas nomigi ĝin „Zamenhofa“. — Depost 1919 delegito de UEA kaj prezidanto de la Zamenhofa Esperanto — S-to en Białystok. — En postaj jaroj vigle kunlaboras en la Societo, kiu sub lia prezido i. a. organizas: du internaciajn postkongresojn kun solena malkovro de Zamenhofa memora tabulo k. fundamento de

SUR POŜTOKARTO.

Kelkaj simplaj vortoj de mia fratosenmomulo en lasta numero de P. E. instigas ankaŭ min al la simila faro. Nenia vivanta lingvo povas esti internacia, do ankaŭ la lingvo de neniu vivanta grupo aŭ „popolo“. Sekve esperantistoj, por ke esperanto fariĝu lingvo internacia vere uzata, devas aŭ morti aŭ fariĝi senmomuloj. Ni devas oferi la gloron esti esperantistoj (personan konatecon en es-

Zamenhof-monumento (1927 k. 1931) kaj unu kongreson de esperantistoj de Białystoka Vojevodia Distrikto. — Samtempe provizas la gazetaron per multajpiresperantaj artikoloj, gvidas kursojn i. a. en la Regna Gimnazio de Grajewo, faras propagandajn prelegojn en Białystok kaj aliaj urboj de Białystoka distrikto. — Vojaĝas al multaj esp. pollandaj kaj internaciaj kongresoj, dum kelkaj el ili prezentas oficiale la urbon Białystok, dum kelkaj el ili redaktas la esp. aldonojn de la gazetaro dumkongrese.

De 1928 — elektita kiel ĉefdelegito de UEA por Polujo, de 1930 membro de Internacia Asocio de Esper. Stenogr. kaj de la Internacia Gazetara Komisiono de ICK, en kiuj aktive kunlaboras.

La literaturan agadon, komencitan jam en knabaj jaroj, daŭrigas per originalaj kaj tradukaj verkoj, aperigitajn en multaj esper. periodaĵoj kaj interalie atingas mencion ĉe Esper. Floraj Ludoj.

Profesie ĵurnalista, kunlaboranto de plej granda kaj disvastigita en Polujo ĵurnalo „Ilustrita Ĉiutaga Kuriero“ kaj aliaj, okupas la postenojn de prezidanto de la Białystoka Ĵurnalista Sindikato, komitatano de Tutpola Sindikato k. membro de la Internacia Federacio. Sur esperanta kampo restas ĝis nun sur la postenoj de Prezidanto de Zamenhofa Esperanto S-to en B-tok, ĉefdelegito de UEA en Polujo k. aliaj, daŭrigante la komencitan antaŭ 25 jaroj fervoran laboron por nia afero.

Jen seka kaj mallonga skizo de poresperanta agado de unu el niaj eminentaj polaj semideanoj. — Ĉu estas necese ankoraŭ ion al tio aldoni? — Ŝajnas ke ne — la 25 jaroj de senlaca, seninterrompa kaj fruktodona laboro — ja plej bone parolas per si mem. — Ni do nur kore gratulu la estimindan jubileanton kaj deziru, ke per sia plua laboro li liveru al ni materialon por skizo al lia ora 50-jara jubileo, kiun li atingu en sano kaj feliĉo.

F. K.

perantista mondo dank' al ĵurnaloj kaj societoj) por la utilo de la lingvo mem. La afero estas tute senduba. Praktike esperantaj senmomuloj devas iom imiti la historion de lingvo latina kiel internacia, pli atakante en siaj agojn aferojn sciencajn kaj teknikajn. Tie estas vera ŝlosilo de internacieco.

Sennomulo esperanta 2.

ESPERANTO EN „GAJA LVOVA ONDO“.

La 5-an de aprilo disaŭdigis nia Lvova radio-stacio sian fame kaj aplaŭde konatan „Wesoła Fala“ (gaja ondo), dediĉitan ĉi-foje al emeritoj, en kiu oni tuŝis Esperanton.

Kion — kaj kiamaniere oni parolis pri nia lingvo — ni citas, laŭ afabla permeso de la aŭtoro de tiu ĉi aŭditaĵo — mgro W. Budzyński — laŭvorte:

„Aprikosenkranz: Lekcja ŝpiewu skończona! Obecnie rozpoczniemy teoteryczny odczyt z dziedziny sadzenia i sadzenia się w szczególności.

Untenbaum: Odczyt wygłosi w języku Esperanto dr. prof. Tamberoza Chwostek.

Tońko: Szczepciu — co to jest ten szperanto?

Szczepko: To taki: nie jest ani polski, ani niemiecki, ani murzyński, — ino jeden język dla całego świata.

T.: Ciekawość: jest jeden język dla całego świata, a narody się w tej genewskiej lidze nie mogą porozumieć.

Sz.: Ta, bu oni nie umieją szpyranto, ino každy po swojemu.

T.: A to trudny?

Sz.: Ta czasem po swojemu trudniej, niż szpyrantu.

T.: A o — szpanuj tu Szczepan — już ta paniusia bałaka.

Chwostek: Moi szanownoi emerytoj kaj dziadoj. Pamiętate szanownoj owoj czaŝoj — jak toj Witosaidos kaj Grabskos skarbos multos dewaluantes. Pamiętate miljonoj markoj, do domoj waszroj trans-

portantes? Peneios waszos w samochodoj ładowantes, tantos multos forsos miajtes. Moi szanownoj bidakoj: nom smar kajtes — pour quoi płaczajtes? Kryzyson ante portas, portkroj waszos podartes, kaj gažroj waszroj obciętes. Tutti sadzroj se dziś — kaj bałakoj — moi wielkroj — moi pułkownikroj, moi ministerjoj. Naco waszroj kłopotroj kaj zgryzotoj? Gwizdajte na forsoj — tutti z kwitkroj na kwiatkroj. Takoj tak Kwiatkowskroj forsoj imperator, Zyndramoj doradcoj, kaj wicepremjerroj z botanikiej od kwiatkroj sztukroj obcinanej nauczantos estos. Dziadoj moi — moi emerytoj — gwizdajte na grandoj, wołajte za mnoj: Eviva kalafiori, eviva kalarepa! eviva figa! eviva Liga! (gwar — brawa)“

Tiom pri esperanto — kaj en „eksterordinara esperanto“ diversaj, humorplenaj aludoj politikaj. Kaj — kvankam ĝi estas nek pola lingvo, nek esperanta, — tamen grava estas nur sola fakto — kaj, scięgo, ke laŭ promeso de s-ro W. Budzyński — kreinto, kaj fervorplena gvidanto de la „gaja ondo“ — unu el la venontaj disaŭdigoj, de ĉi tiu plej populara aŭditaĵo de Pola Radio, — tuta estos dediĉita al Esperanto.

Estas ankaŭ eble, ke oni preparos en Lvovo gajan aŭditaĵon en Esperanto por eksterlando. Se konsentos — Warszawa.

Do, ni ĝoje atendas...

Józef Toczyński.

Lwów, aprilo 1936.

POLLANDA KRONIKO.

BIAŁYSTOK. Zamenhofa Esperanto. S-to en nia urbo dum la tuta vintro organizis konstantan kursojn de Esperanto, kiujn partoprenis multa nombro da lernantoj. Ĉiuj kursojn gvidas s-ro Dorosko. La Komitato de nia S-to organizis por membroj diversajn entreprenojn por interesigi la Esperantistaron en nia urbo. Menciindaj estas la Komunaj teovesperoj kaj ekskursoj, kiuj ĉiam havis multan sukceson. Multan propagandon faris la laste aranĝita balo de nia Societo, kiu estis bone vizitita kaj donis al S-ta kaso monan profiton, dank' al kiu nia S-to povas nun pli forte labori, propagandante nian aferon en Zamenhofa naskurbo. Ĉe Zam. Esp. S-to fondiĝis Komitato por festi 25 jaran jubileon de ĝia senlaca prezidanto S-ro

J. Szapiro. En la Org. Komitato eniris: Prez. s-ro Natan Szturmakiewicz, vicprezidantoj W. Osowicki kaj J. Dubiński. Sekretario E. Jabłoński, kasisto Ch. Brawerman. Kiel membroj s-ro Józef Dines, M. Lewin G. Gurman, s-inoj Kozłowska-Knaŭp, Kotok—Perlis kaj f-ino Ch. Pomeranc. La daton de tiu soleno ni fiksas por la 9-a de majo n. j. La Organiza Komitato disvolvis nun viglan laboron por dece honorigi sian longjaran prezidanton.

LUBLIN La 23. I. finiĝis kun bona rezulto dumcnata kurso de Esperanto, aranĝita de P.E.A. kaj gvidita de s-ro Mgro Czesław Pruski, Delegito de U.E.A. — Kun tre bona rezulto finis la kurson s-ino W. Kurkowska.

La novan jaron komencis la Societo

per energia laboro. La 29. I. k. j. prezidanto de la Societo Dro J. Mędrkiewicz prelegis je temo: „ORIGINALA VERKARO DE ZAMENHOF”. — La 5. II. k. j. prelegis prezidanto s-ro Dr. J. Mędrkiewicz je temo „VERKARO DE GRABOWSKI”. — La 12. II. k. j. prelegis vicprezidanto de nia Societo s-ro Mgro Cz. Pruski je temo „ABISENIO”. — La 19. II. k. j. okazis „DEKLAMVESPERO” en kiu partoprenis s-ro A. Abramek, s-ro E. Majewski, s-ro Dro J. Mędrkiewicz, f-ino K. Obroślińska kaj s-ro Mgro Cz. Pruski. — La 4. III. k. j. okazis „VESPERO DE NEATENDITAJOJ” (WIECZÓR NIESPODZIANEK). — La 11. III. k. j. okazis en Societejo (Królewska 6) belega koncerto je banjo-instrumentoj kun esperantaj kantoj, en kiu partoprenis s-ino Ola Stefaniak, s-ro S. Stefaniak kaj s-ro Mgro Cz. Pruski. Krome s-ro Z. Brzeziński prezentis perfektan imiton de forveturanta vagonaro. — P. E. A. grupo Lublin nombras nun 71 membrojn kaj havas ŝancojn de plua disvolviĝo. — Alilokaj samideanoj estas ĉiam bonvenaj.

La 14. I. k. j. mortis samideano, membro de nia Societo s-ro Stanisław Janowski.

Malgraŭ, ke li estis maljuna kaj havis multe da zorgoj, li estis vera kaj fervora esperantisto, kiu sindone laboris por propagando de Esperanto en nia urbo.

LWÓW. S-ro Józef Toczyski, la fervora ĉe-instruisto el Kraków, kiu gvidis bonsukcesajn kursojn por skoltoj en Tarnobrzeg, parolados al Lvovaj skoltoj, pri nia movado. La pola skoltgazeto „Skaüt” envicigas regulajn partojn pri Esperanto, gviditajn de s-ano Toczyski. Regulajn tradukojn el hungara skoltgazeto „MAGYARCSEKÉSZ” prizorgas Esperante f-ino M. Mantel.

Lvova klubejo troviĝas ĉe str. Kochanowskiego 25. Gastoj ĉiam bonvenataj.

Preterpasantaj nian urbon samideanoj, bonvolu ĝustatempe avizi fraŭlinon M. Mantel, ul. Janowska 109, kiu stacidomservas kaj gvidas.

WARZAWA. Varsovia Esperantista Societo ŝanĝis sian sidejon, kiu troviĝas nun ĉe la str. Zielna 29/10, tel. 271-43. Pro la alproksimiĝanta somero ĝi funkcias nur dufoje en la semajno; marde kaj ĵaŭde, h. 20—22. La Societo organizis nun multnombran kurson por komencantoj.

La 26. III. 1936 j. okazis jarkunveno de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo — „STEP”. La raporto de la estraro pri agado de l' pasinta jaro konsistis el raporto de la sekretariino, kasisto kaj de la Revizia Komisiono. La ĉeestintoj sciigis pri grava sukceso de STEP; nome: dank' al klopodoj de la prezidanto, s-ro konsilanto Wyszyński, Trafikministerio decidis eldoni ĉiujn aperontajn broŝurojn kaj prospektojn ankaŭ en Esperanto. La Ministerio eldonos nun la broŝurojn-prospektojn en 12 lingvoj kaj en ili la lokon havas ESPERANTO. Ĉiujn tradukojn la Ministerio donos al Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo.

En la estraron estas reelektitaj: konsilanto Bronisław Wyszyński, red. St. Lubliner, Halina Weinstein, dr. M. Reichert, Eug. Rytenberg, konsilanto L. Klimecki, Al. Hartman. Kiel anstataŭantoj: J. Jarecki, adv. K. Mamrot kaj Szwajs.

La Konsilantaro de STEP konsistas el: prof. Bujwid, Leo Belmont, dr. J. Krenicki, St. Karolczyk, red. Ant. Pisarski, J. Pomorski, dr. H. Raszkes, dr. Róbin, inĝ. J. Skrzypieński, starosto J. Trzópek, konsilanto K. Zajączkowski kaj dr. Zofja Zamenhof.

La Juĝantaro konsistas el: dr. W. Knappe, dr. Ign. Krenicki, adv. J. Litauer, Al. Różanykwiat kaj inĝ. M. Szabuniewicz. Kiel anstataŭantoj: mgr. W. Mamrot kaj B. Weintnal.

STEP, kunlaborante kun PED, aranĝas la ekskurson al la VII Pollanda kongreso de Esperanto, okazonta en Kraków en la tagoj 31. V. — 1. VI. 1936, kaj al la XXVIII Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Vieno en la tagoj 8—15 aŭgusto 1936.

STEP okaze de la XXVIII Universala Kongreso de Esperanto en Vieno aranĝis la 24. IV. 1936 en Filharmonio en salono de „Lutnia” grandskalan Aŭstrian Vesperon sub la Alta Protektorado de Sinjoro Maximilian Ritter von Hoffinger, Ministro de Aŭstrio. La Vespero bonege sukcesis.

Juna, 24-jara laboristo, esperantisto, fraŭlo serĉas laboron. Kiu el samideanoj helpos por min laborigi? Skribu al: **Jan Buchtik, Stawok Nr. 112. p. Piásek.**

SKOLTA ANGULO.

Atentu — jamboreo 1937!

La skoltaro devas denove streĉi sian forton: okazos jamboreo en 1937. En raporto pri la rovertendaro apud Stokholmo ni legis, ke inter aliaj estis la kutima lingvokonfuzo. Sed ĉu restu tiu bela kutimo en skolta tendaro? Ĉu ne estas nia devo ĉie atentiĝi, ke ekzistas rimedo forigi la babelan konfuzon?! Espereble la legantoj de „Pola Esperantisto“ scios sian devon kaj instigos la vizitontojn al la jamboreo, ke ili studu antaŭe Esperanton kaj povu pli vaste uzi ĝin, kiel okazis bela komenco en 1933 en Gödöllő.

Hungaraj skoltoj invitas.

Hungaraj skoltfratoj ŝojos, se en 1936 dum somero eble post la Univ. Kongreso de Esp. en Vieno samideanoj vizitus hungarajn tendarojn, ekzercante samtempe Esperanton. Interesiĝantoj skribu al Hungara Skolta Esp.-Rondo, Budapest,

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

Pollingva monata gazeto por geografio kaj turismo s. t. „Zbliska i Zdaleka“ enpresas de septembro 1935 por-esperantajn notojn kaj artikolojn. En numeroj januara, februara kaj marta de 1936 aperis tri artikoloj de Lvova samideano dro Karol Klein. Ĉi tiuj artikoloj bonege taŭgas kiel propagandilo de nia movado. Gvidanto de la esperanta fako, s-ro Jacek Piątkowski, promesas aperigi korespondadojn, akiritajn dank' al eksterlandaj samideanoj. La adreso de redakcio kaj administracio: „Zbliska i Zdaleka“, ul. Boularda 5, Lwów, Polujo.

Ni eksciis pri la morto de unu el plej sindonemaj s.-anoj en Genova. Forlasis niajn vicojn nia kara „Onklo Miĉjo“—Miĥaelo Arabeno. Antaŭ unu jaro li partoprenis Internacian Esp.-Kongreson. Li estis fervora esperantisto kaj aŭtoro de verko: Devoj de l' Homo.

Por la tuta esperantistaro estas granda perdo.

Ni ankaŭ eksciis pri morto de H. Bonnevie, konata norvega samideano.

9-a Jugoslava kongreso de Esperanto okazos en Ljubljana dum Pentekosto, 30-an de majo — 2-a de junio 1936.

V Nagy Sandor u 6. Atentigu viajn amikojn pri tio! Anoncu en via skolta revuo.

XIV-a SEL Tendaro en Anglujo.

Kiel anoncite la nunjara Internacia Skolta Tendaro okazos en la lulilo de Skoltismo — Anglujo. Tendarloko — IPSWICH (legu: Ipsüiĉ.) Kotizo por la tuta ekskurso 37.50 sv. fr. Tendartempo 18—29 de julio. Pasporton kaj vizon ĉiu prizorgu por si mem. Ekipaĵo: — por helpi al pli facila vojaĝo, la O. K. aranĝos pruntedonon de lankovriloj. Programo definitiva estas jam preta (kutimaj tendarfajroj, diservoj, ludoj, kunveno de SEL, banado, vizito al Londono) ĉefa instrucentro de skoltoj ĉe Gilwell-Parko, universitata urbo Cambridge, marbordo ktp. Detalojn petu de O. K. 54 Constable Road, Ipswich. Suffolk — Anglja.

Skolta festo en Bratislava je la fino de majo. — Petas ekspozician materialon aranĝanto: Skoltoficiro Aleks. Csader, Bratislava I. Lakatos u 8. Ĉeĥoslovakujo.

Nederlanda Esp.-kongreso okazos dum Pentekosto 30—31 majo 1936 en Leeuwarden, la ĉefurbo de la provinco Friesland.

Ni instigas precipe la eksterlandanojn, viziti ĉe tiun kongreson. Kompreneble ni unualoke faras tion por la Esperantomovado kaj por nia nederlanda kongreso, kaj ni kredas ke la alloga programo tute kontentigos la vizitontojn.

Sed ni havas ankoraŭ alian motivon. La provinco Friesland ĝis nun estis iomete izolita. Pro la mondfama mardigo, kiu ligas la provincojn Noord-Holland kaj Friesland tiu izoleco ne plu ekzistas kaj iom post iom la mondo sciigas, ke la lagoj de Friesland apartenas al la plej belaj en la mondo. La esperantistoj nun havas la okazon konantiĝi pri tiuj lagoj.

La ŝtata fervojaro donas grandan rabaton al la kongresvizitantoj.

Petu aliĝilon aŭ plurajn informojn al la sekretariino de la L.K.K.

Fraŭlino Laverman, Molenpad 69, Leeuwarden.

NOVA SUKCESO EN DANLANDO.

Post multaj kaj longaj klopodoj Dana Esperanto Instituto fine sukcesis translokigi siajn Internaciajn Feriajn Kursojn Esperantajn al la Internacia Altlernejo en Helsingor (Elsinoro), loko konata el „Hamleto“. Tiu altlernejo estas unika en sia speco, ĉar ĝi estas vere internacia.

instruante per ĉiuj modernaj lingvoj pri ĉiu ajn kultura afero. Ĝis nun Esperanto ne estis aplikata tie.

Ĝis nun niaj Internaciaj FERIAJ Kursoj en Esperanto okazis en Silkeborg, sed pro grava manko de lokoj (pro la daŭra kreskado de la partoprenantaro) la sukceso de la Internacia Altlernejo estis tre favora okazo.

La Internaciaj Esperantaj Kursoj okazos en la venonta somero: I' a kurso por ĝeinstruistoj-komencantoj laŭ Cseh-metodo de 19/7 — 25/7, sub gvidado de la eminenta Cseh-pedagogo F-ino M. Saxl. Tuta prezo por loĝo, manĝo kaj kurskotizo nur 35, — Kr. aŭ 41,— zł. La malaltan prezon kaŭzas la malmulta valoro de la dana krono.

II' a kurso: Por progresintoj, de 26/7 — 5/8.

III' a kurso: Prepara kurso por Cseh-metodaj ĝeinstruistoj, ankaŭ de 26/7 — 5/8.

La II' an kaj III' an kursojn gvidos F-ino Saxl, s-ro de Waard kaj aliaj diverslandaj eminentuloj. Prezo por II' a aŭ III' a kurso por loĝo, manĝo kaj kurskotizo nur 50,— Kr. aŭ 58,— zł.

La kursojn aranĝas kaj garantias Dana Esperanto-Instituto.

Detalaj informoj aperos poste.

L. Friis,

Sekretario de Dana Esperanto-Instituto.

Thyrasvej 13,

Aabyhøj, Danlando.

BRAJLA ELDONO DE LIBRO PRI MARŜALO PIŁSUDSKI.

Vigla organizaĵo: Związek Ociemniałych Żołnierzy R. P., Warszawa. Hoża 1, m. 2, kuniganta ĉ. 650 militblindulojn de Pola Respubliko, eldonis en brajla skribo la konatan libron de W. Sieroszewski — Marŝalo Piłsudski, tradukitan en Esperanton de samideano mgr. B. Strelczyk. La libron senpage ricevos ĉiuj brajlaj bibliotekoj de 25 blinduloj — organizaĵoj diverslandaj, kiuj apartenas al la Universala Asocio de Blindulo-Organizaĵoj (UABO), kiun forte akcelas polaj militblinduloj.

ESPERANTO PROGRESAS INTER LA BLINDULOJ.

Vere mirindaj estas la sukcesoj de Esperanto - movado inter la tutmonda blindularo. Ilia internacia federacio: UABO — ekzistanta eĉ depost 1932 j., ampleksas jam 25 diverslandajn membro — organizaĵojn. Inter ili troviĝas tiaj tutlandaj, gravaj blindulo-organizaĵoj, kiel tiuj de Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Finnlando, Hispanujo, Hungarlando, Irlando, Norvegujo, Polujo, Svedujo k. a. UABO eldonas brajle: „Esperanta Ligilo“ kaj nigre: Ligilo Por Vidantoj. Ĉiujare la nombro de brajlaj esperantaĵoj kreskas

dank' al vigla agado de la UABO-presejo en Stocksund (Svedujo) kaj naciaj brajlaj presejoj en diversaj landoj. Lastatempe la fama jugoslava blindulamiko, V. Ramadanoviĉ, direktoro de la blindulejo en Zemun, eldonis la Krestomation de Zamenhof, UABO eldonis Klasikan legolibron de E. Robert (Francujo), Konversacian Literaturon de Ĉeĥ, en preparo estas Dia komedio de Dante. Potenca tutrusia blinduloorganizaĵo: WCS eldonis jam duan Almanakon, destinitan por tutmonda samideanaro. La ekzistantaj esperanto-fakoj de blindulbibliotekoj konstante pligrandiĝas per la manskribitaj esperantaĵoj dank' al sinoferema laboro de blindulamikoj. Radio ankaŭ staras jam en la servo de UABO, kies sciigojn ĉiumonate dissendas la sendejo Lyon la Doua. Agoĝoj „Skolta Esperanto Ligo“ (SEL) kunlaboradas kun UABO, subtenante ties agadon. La movado ĉiam plipotenciĝas, reviviĝas tie, kie ĝi antaŭ nelonge ekdormetis, ekestas en la landoj, kie ĝi ĝis nun eĥis nur inter la unuopuloj. Esperanto evidentiĝis kiel utiliga ilo de internacia kunlaborado kaj viva ligilo de tutmonda blindularo.

Jan Sihan.

Esperanto kaj Internacia Societo por Virinoj en Japanujo.

„Kokusai-Sizyo-Sinzen-Kyokai“ (Internacia Societo por Virinoj k. Infanoj) fondiĝis antaŭ tri jaroj, celante komprenigi Japanujon al eksterlandanoj kaj pli-profundiĝi internacian amikecon pere de la manoj de virinoj kaj infanoj. Subtenate de multaj eminentuloj en — kaj eksterlandaj, la societo jam multe kon-

tribuis al la celata kampo, malgraŭ ĝia mallonga historio.

En la societo oni starigis Esperanto-fakon en tiu ĉi januaro, kaj traktas ĉefe jenajn aferojn:

1. Korespondado kun fraŭlinoj, samideanoj el ĉiuj landoj.

2. Okazigo de Esperantaj kurso, kunveno, ekspozicio ktp.
3. Eldono de gazeto, gvidlibro ktp., por konigi japanan kulturon.
4. Gvido kaj helpo de eksterlandaj vizit-ontoj kaj -antoj k. c.

Ankaŭ en la organo de la societo „Seikai to Zyosei” (Mondo kaj Virinoj) komenciĝis Esperanto-paĝoj por lernigian lingvon al la legantoj. (La societo volonte akceptos reciprokan interesanĝon de la gazeto kun la eldonejoj kaj redak-tejoj. Kaj individuaj esperantistoj, kiuj volas havigi al si la gazeton, sendu 1 respondkuponon al la suba adreso).

Bonvolu sendi al ni interesajn artikolojn, ekz. pri lerneja vivo. ĉiutaga vivo, moroj kaj kutimoj de knabinoj por la gazeto. Kaj sciigu vian adreson al la sekretariino, se vi estas malpli ol 30 jara junulino, kaj volas korespondi kun japanaj knabinoj kaj junulinoj.

Ĉiujn korespondaĵojn sendu al la jena adreso.

F-ino Yukiko Isobe, Sekretariino de
Kokusai-Sizyo-Sinzen-Kyokai,
7—5, Binza-Nisi, Kyobasi, Tokyo,
Japanujo.

ESPERANTO ANSTATAŬ ANGLA LINGVO EN JAPANA LERNEJO.

Ĝis nun en Japanujo la angla lingvo estas rigardata kiel unua fremdlingvo por lernantoj. Sed de la lasta aprilo, kiam nova lernjaro komenciĝis, s-ro Maruyama, lernejestro de la Sesa Knabina Liceo en Tokyo (Tokyo-Huritu Dai-6 Koto-Zyogakko), enkondukis Esperanton, kiel regulan lecionon por la unua-jaraj lernantinoj, anstataŭ la angla lingvo, kaj malfermis novan vojon epokfaran por lingvo-instruado en Japanujo.

Ĉar la instruisto estas s-ro Yoŝi H. Iŝiguro, meritplena, agema pioniro de nia movado, sukceso de tiu nova Esperanto-klaso estas senduba. Jes, liaj lernantinoj jam montras mirindan progreson, ekz. ludis eĉ teatraĵeton je la okazo de lastjara Zamenhofa tago.

Bonvolu kuraĝigi la gvidanton kaj lernantinojn per alsendo de leteroj, kartoj kaj Esperantaĵoj, libroj, gazetoj, afiŝoj ktp.

Adreso: S-ro Yosi H. Isiguro, Huritu
Dai—6 Koto-Zyogakko, Siba,
Tokyo, Japanujo.

VORTOJ DE LA PREZIDANTO.

KIOM SAGAJ NI ESTAS? Antaŭ kelkaj jaroj, okaze de mia mondvojaĝo, mi ie vizitis frenezulejon. Mi miris, ke nur malmultaj helpantoj tenis ordon en la granda institucio, en kiu troviĝis multaj danĝeraj enloĝantoj.

Mi esprimis mian miron al la direktoro. Sed li klarigis al mi: „La frenezuloj ne organizas sin. Ili ne sin grupigas por komuna atako. Se unu atakas, la aliaj preskaŭ ĉiam restas indiferentaj. Ili tute ne komprenas, ke oni devas agi kune, se oni volas atingi celon”.

Poste venis al mi la jenaj demandoj: Ĉu ĉiuj homoj, kiuj sin konsideras sagaj komprenas, ke oni devas sin organizi, se oni volas atingi celon? Ĉu ĉiuj Esperantistoj komprenas, ke nur per komuna laboro — per komuna atako ni venkos la mondon? Se regas organiza indiferenteco inter la Esperantistoj, kiel ni povas esperi konkeri eĉ pli indiferentan mondon? Ĉu ni volas agi kiel la frenezuloj? Kiam iuj fervoraj samideanoj oferas sian tempon kaj energion — ĉu aliaj inter ni volas agi, kiel la mense malfeliĉaj homoj, kaj resti indiferentaj? Kiam vi iam pli poste trovos bonan okazon por enkonduki Esperanton en iun lernejon, ĉu vi vo-

los konvinki la lernejestron tute sole, aŭ kun la helpo (konsiloj kaj prestiĝo) de forta nacia aŭ loka organizo?

Se vi konas gesamideanojn, kiuj ĝis nun ne estas membroj de Espanto-Asocio de Norda Ameriko, ĉu vi ne bonvolus rakonti al ili, kiel agas la frenezuloj, kiel ĝin al mi klarigis la direktoro. Espereble ili komprenos la neceson kaj saĝecon sin organizi, kaj espereble ili fariĝos membroj kaj fidelaj kunlaborantoj de E. A. N. A.

Joseph R. Scherer.
Represo el februara nro de
Amerika Esperantisto.

EPIZODO.

Ni grimpas supren. La vojon baras dense arboj kaj arbustoj, kvazaŭ severe gardante iujn strangajn misterojn. La piedoj glitas sur seka musko, sed malgraŭ ĉio ni grimpas supren, ĉiam supren. Ne gravas, ke vilaj branĉoj de abioj pikas la korpojn, disŝiretas la vestaĵojn, sed grave estas, ke en niaj vejnoj rapide cirkulas la varma sango, ke la koroj batas ofte, intense kaj ke ni ambaŭ estas junaj.

De malproksime ekaŭdiĝas kukolo,
— Ni kalkulu, kiomfoje ni interkisi-
ĝu — mi proponas ŝerce.

Unu, du... tri... kvin... ok... La kukolo
kukuas seninterrompe.

— Ho, kiom multe, — ŝi ridas petole-
me, vidigante la neĝblankajn dentojn.

Mi tuj volas plenumi la verdikton. Sed
ŝi haltigas min.

SERGEJ JESENIN.

LETERO AL LA PATRINO.

Ĉu bonfartas vi, patrino kara?

Vivas mi. Saluton, patrinet'!

Super via kabanet' kampara

Brilu lum' vespera en kviet'.

Oni skribas, ke vi maltrankvilas.

Ke pri mi sopiras via kor',

Ke vi en paltet' malnova iras

Sur la vojon en vespera hor'.

Kaj al vi en la krepusko blua

Jena bildo prezentadas sin

Kvazaŭ iu en drinkejo brua

Per tranĉilo finna vundis min,

Ho, vi trankviliĝu, mia bonal

Estas nur deliro via tim',

Ja ne estas tia mi fripono

Ke mi mortu ne vidinte vin.

Mi ja restis same amoplena,

Revas nur pri tio en sekret',

Ke reveni iĝu la ĉagreno

Baldaŭ min al nia kabanet'.

Mi revenos kiam en ĝardeno

Blanke floras arboj dum printemp'.

Sed ne voku min dum frumateno

Kiel iam dum antaŭa temp'.

Vi ne veku miajn disreviĝojn,

Lasu ĉion, kio pasis for, —

En tro juna aĝo ĉian malfeliĉon

Devis sperti mia laca kor'.

Ankaŭ preĝi ne instruu min. Ja, vane!

Al malnov' ne rekondukos voj'.

Vi nur helpas min per via amo,

Vi nur estas mia sola ĝoj!

Do forgesu vian maltrankvilon,

Tro ne sopiradu via kor'.

En paltet' malnova vi ne iru

Sur la vojon en vespera hor'.

tradukis Hilda Dresen.

Zawiadamy, iż „Ondo de Daŭgava“
nie będzie wydawane w roku bieżącym.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie
zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. ro-
cznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. sw. Numer
pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony
zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja:
małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

— Ne... nun..., tie supre..., en la su-
no... — promese flustras ŝiaj koralaj, su-
kaj lipoj.

...Kaj, mano en la mano, ĝojaj, viv-
plenaj, ni grimpas supren, ĉiam pli su-
pren, al la montpinto, al la suno, al la
feliĉo.

I. Dratwer.

**LA 19. V. JE LA 22b45 AŬSKULTU
INTERESAN RADIOPRELEGON EL
KRAKÓW KAJ WARSZAWA.**

**WAŻNE DLA SZKOŁ I SAMOUKÓW!
Z N I Ż K A C E N Y.**

Już ukazało się II-gie wydanie aprobo-
wanego przez Ministerstwo W. R. i O. P.
podręcznika esperanckiego p. t. „LEK-
CJE JEZYKA ŚWIATOWEGO ESPE-
RANTO“ — w opracowaniu prof. Sy-
gnarskiego z przedmową prof. uniw. dra
Bujwida. Cena podręcznika, zupełnie
zmienionego znacznie rozszerzonego i
zaopatrzonego w dwa słowniczki — tyl-
ko 1.60 zł., przesyłka 25 gr. Do nabycia
w Administracji „Pola Esperantisto“,
Kraków, Lubicz 34. (Konto PKO 406.660)
lub w „Naukowym Kole Esperanckiem“,

Bydgoszcz, plac Wolności 9.

(Konto PKO 141.787).

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcz-
nika „Pola Esperantisto“ skutecznie
można na konto PKO Nr. 406.660 lub
przekazem rozrachunkowym, kartoteka
Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym kosz-
ty przesyłki.

Ĉu vi jam legis la rakonton de
Henryk Sienkiewicz; Orso

trad. A. Oberrotman

Prezo; zł. 1.10 kun aŭfranko.

Mendu tuj ĉe „Pola Esperantisto“

Kraków, Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN A-
BONANTOJN. SULDANTAJN ANKO-
RAŬ LA ABONON POR J. 1935. PAGI
LA SULDON JE NIA KONTO PKO
No 406.660.**

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por
societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł.
6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero
zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.—
1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto
de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.